

37-a jaro. N. 87. 1-a semestro 2011.



VENEZUELA STELO

Organo de la Venezuela Esperanto-Asocio

ISSN 1316-0451



Prelego pri Lingvaj Rajtoj

La 63-a Internacia Fervojista Esperanto-Federacia Kongreso
Internacia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo
84-a SAT-Kongreso en Sarajevo

Traduko: La Pupovendejo
Recenzo: Kredo, floroj, dinamito



Enhavo

Naciaj Novaĵoj paĝo 3-a**La insulo de Nemo (VIII)**

Johano Negrete paĝo 6-a

La 63-a Internacia Fervojista Esperanto-Federacia Kongreso

Raportis: Liba Gabalda paĝo 8-a

Beletro sed ne el katedro

Johano Negrete paĝo 10-a

Kredo, floroj, dinamito

Johano Negrete paĝo 11-a

Internacia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo

Raportis: Liba Gabalda paĝo 12-a

La Pupovendejo (La tienda de muñecos)

Tradukis: Ricardo Coutinho paĝo 14-a

84-a SAT-Kongreso en Sarajevo

Raportis: Liba Gabalda paĝo 16-a

La dek plej stultaj asertoj de historio

Tradukis: Ramo Moraloj-Kastelo paĝo lasta

Pri la enhavo de niaj artikoloj repondecas iliaj aŭtoroj.

Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio.

Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton.

Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligis al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.

**VENEZUELA STELO**

Organo de la Venezuela Esperanto-Asocio

Asociación Venezolana de Esperanto
Venezuela Esperanto-Asocio

VENEZUELA STELO
Apartado postal 47675, Caracas 1041-A
telefonnumero 58-0212.662.9224
www.esperanto-venezuela.org
venesperanto@cantv.net

Redakcia Komisiono:
Johano Negrete, Esteban Emilio Mosonyi
kaj Ricardo Coutinho.

Grafikisto: Ramón Morales Castel.
(Ramo Moraloj-Kastelo).

Estraranoj:

Prezidanto: Johano Negrete.
Vic-Prezidanto: Juan Miranda.
Sekretario: Ricardo Coutinho.
Kasistino: Elizabeth Miranda.

Aldelegitoj:
Esteban Mosonyi
(Konferencoj kaj Interinstituciaj Rilatoj).
Nancy Aquino (Eldonado).
Aquiles Rivas (Biblioteko).
Silvana Messori (Instruado).

Kunlaborantoj:
Liba Gabalda.
Ramo Moraloj-Kastelo.



Naciaj Novaĵoj

Prelego: Kio estas la Esperanta kulturo?

Tiu prelego okazis je la 26-a de Marto 2011 en la hispana lingvo, la profesoro Johano Negrete parolis pri la koncepto de kulturo kaj poste montris al ĉiuj ke Esperanto fakte havas internacian kulturon, tio kontraŭas la tradician antaŭjuĝon ke kulturo nur kaj nepre rilatas kun nacia aŭ etna afero.

Prelego: Kio estas Esperanta kulturo?

Tiu prelego okazis je la 9-a de Aprilo 2011, prelegis Johano Negrete. Ĝi okazis en esperanto kaj kun la partopreno de preskaŭ ĉiuj asocioj. La profesoro parolis pri la koncepto de kulturo kaj poste montris al ĉiuj ke Esperanto fakte havas internacian kulturon, tio kontraŭas la tradician antaŭjuĝon ke kulturo nur kaj nepre rilatas kun nacia aŭ etna afero.

Prelego: Las vías del conocimiento de Parménides

La lernanto de la Lernejo de Filozofio de la UCV, Carlos Ponce, prelegis hispane pri tiu malmulte konata filozofo, rakontis pri lia graveco en la evoluo de la filozofio kaj donis kelkajn ekzemplojn kaj ekzercaĵojn kiujn Parmenideso uzis por trovi konon. Tiu prelego okazis en nia asocio je la 7-a de majo 2011.

Prelego: Historio de Esperanto en Venezuelo

Je la 4-a de junio 2011, Ricardo Coutinho donis listaron da gravaj okazaĵoj pri esperanto en nia lando,

montris kelkajn fotojn, fotokopiojn de revuoj kaj historiaĵojn, kantojn tradukitajn por niaj antigvaj samideanoj, ankaŭ parolis pri la diferenco inter komunumo kaj movado.

Prelego: Esperanto, Ĉu nova latino por la katolika eklezio?

La profesoro Johano Negrete parolis pri la graveco de internacia lingvo por la Katolika Eklezio, la uzo de la latina lingvo dum jarcentoj en Okcidenta Eŭropo kaj ĝia uzofaliĝo la avantaĝoj de la uzo de esperanto en internacia mondo kaj specife en tiu internacia institucio kiu prenis ĝian nomon de la greka signifo Universala Asembleo. Tiu prelego okazis je la 9-a de julio 2011.

Prelego: Lingvaj Rajtoj kiel Homaj Rajtoj

En nia sidejo, je 18-a de junio 2011, La profesoro kaj specialisto pri Homaj Rajtoj, Oscar Mago, prelegis pri historio de la lingvoj, imperiismaj lingvoj, kulturo pere de la lingvoj, konstitucioj kiuj apogas indiĝenajn lingvojn, ĉiuj lingvoj estas riĉaj heredaĵoj de la homaro, internaciaj leĝoj, la uzado de nia propra lingvo estas rajto "natura", la Deklaracio de Homaj Rajtoj, la Eŭropa Ĉarto. La profesoro Estaban Emilio, fama lingvisto en Venezuelo, diris ke la oftaj ciferoj pri la malapero de indiĝenaj lingvoj ne estas ekzaktaj ĉar en ili ne estas elkalkulitaj apoguloj, instituciaj strategioj por restarigi la mortontajn lingvojn, ktp.



Interparolantaj pri la Historio de Esperanto en Venezuelo



Interparolantaj pri la Historio de Esperanto en Venezuelo

Venezuela Esperanto-Asocio





Prelego pri Lingvaj Rajtoj





La insulo de Nemo (VIII)

Johano Negrete

Meze de korala verda maro, Nemo kaj Munja veturis rekte kaj rapide al la kajeo Pajklana, dum la pruo de la boato, kondukita de Laŭtaro, tranĉis la marakvon, verŝante salan ŝaŭmon kontraŭ ambaŭ flankoj de l' transportilo, kaj disgutate iliajn vizaĝojn. Munja spontane kaŭzis ridon al la du viroj, kiam ŝi kun malseka vizaĝo, frotinte la okulojn, turnis defian la rigardon al la maro, gestis kontraŭ ĝi kaj, kun impeto de ludmomento, protestis kaj montris grimacojn, skoldis kaj eĉ sian langon elirigis por esprimi malŝaton, sen manki aldonaj grimacoj kaj riproĉ-admonoj por eduki la maron.

La vojaĝo estis mallonga kaj tre baldaŭ emerĝis antaŭ la pruo la kajeo Pajklana, kiel lasta etapo de la taga marekurso. Iom post iom la boato alproksimiĝis al la bordo. Nia geparo baldaŭ piediris jam kun siaj provizaĵoj tra la sabla insuleto, esplorante la lokon, kiun Munja ne konis. Laŭ aranĝo kun Laŭtaro, ĉi lasta foriris kaj alvenos je la kvina horo kun la boato por revenigi la geparon. Ili do restos tie senpilote kaj senbarke.

Surstrande ĉio aspektis bele, ĉar apenaŭ du dekduoj da tendoj staris ankoraŭ en Pajklana. Senventa kajeo, kun pli da protektado el la suno ol en Varadero, vegetaĵaro proksima al marbordo prezentis tiun aspekton de songita plaĝo por enamiĝantoj, kiuj sence deziras resti en iu ajn mondofino nutrante sin nur el amlikvoro. Vere malmultaj vizitantoj. Ankoraŭ pli bele. Do, ili havis grandan spacon por kuri kaj naĝi. La suno ne montriĝis tiom severa kaŭze de la abundo de kokospalmoj kaj aliaj vegetaĵaroj.

Munja delasis siajn survestojn, kaj jam kun sia blanka banvesto decidis kuri por provoki Nemon al persekutado.

—Ha, mia kara, ne fuĝu, venu ĉi tien!
Malkuraĝulino! —diris Nemo ridentante.

—Mi volas esti libera de vi! —kriis Munja turniĝante sian rigardon al la viro dum sekvis sian forfuĝon ĝis la marondoj. Enirante la tajdojn ŝi submerĝis en la kristalan verdan akvon de la postagmezo, plaŭdante kun granda bruo. Mansalutis kaj sendis kison al sia karulo. Tamen apenaŭ ŝi montris intereson inviti lin.

Intertempe li eksidis sub palmo por "liberigi ŝin" kaj observi ŝian solon. Pri kio ŝi povus pensi en tiu kirlo de tajdoj? demandis al si Nemo. Tio nur ŝajnas ludo de infanoj. Venis la tajdoj, ŝi submergis kaj ili

trenis ŝin kelkajn metrojn ĝis la marbordo. La operacio ripetiĝis unu kaj alia fojo, dum Nemo rigardadis pacience kiel la virino ĝuis kaj saltis kiel fiŝo lanĉita al la aero. Munja povis esti tre gaĝa kelkmomente kaj poste eniri deprimiĝon. Tia estas la virino! Ne, eble ne, eble kliŝo tre taŭga, kiam oni ne komprenas la balanciĝojn de la homa konduto, konkludis Nemo en sia pripenso.

La muziko de la tajdoj falis iom post iom dum la tempo pasis kaj aroj da birdoj kaj mevoj retiriĝis al la firma tero. Pasis proksime du fiŝkaptaj ŝipoj kun nubo de albatrosoj cirkaŭante la fiŝadon. La suno anoncis la horon de sunsubiro pro ĝia kreskanta orkoloro. Marbrizon invadis la linion de la plaĝo kaj la temperaturo ekmalaltiĝis. La geparo, naĝis, kisis unu al la alia, finsunbanis kune sur malonga doko kaj ambaŭ rigardis kelkajn boatojn alveni por preni la pasaĝerojn, kiuj restis en Pajklana.

Estis jam la alvenhoru de Laŭtaro kun ties boato, sed li ne aperis. Unu horo pli pasis kaj ilia boatisto ne revenis, do tio komencis zorgi al niaj geamikoj. Munja etendis la rigardon sur la antaŭa kajeo, vidante kiel aliaj boatoj alvenis akurate por preni pasaĝerojn. Baldaŭ la insuleto malpleniĝos. La ideo esti forlasita en la kajeo komencis ĝeni niajn protagonistojn, ĉar ili ne volis pasi la nokton tie aŭ eble volus... sed ne devis. Verŝajne io okazis al la boatisto, kaj tiam ili sin demandis kion fari. Fine, ambaŭ vidis la lastan boaton tutplena starti el la doko, sed pro manko de iciatemo Nemo kaj Munja ne aŭdacis peti helpon al ĝi. Ankoraŭ ili fidis atendi Laŭtaron, kvankam tia fido ekmontriĝis senutile.

Jam la sesa kaj duono kaj la vespero ofte malheliĝas dum la akvo kvetiĝas kaj la ombraj koloroj ekaperas. La geparo moviĝis kun siaj dorsosakoj tra la strando dezirante trovi aliulojn, sed vidis neniun. Ĉe la turniĝo de angula plaĝo-arko, aperis alia plaĝeto kaj ili vidis kabanon inter palmoj. Tie pendis ekstera plato kun nomo kaj ŝildo: "Nacia Gvardio". Unu gvardiano ĉeporde atentis klarigon de Nemo pri ties situacio, laŭ kiu la geparo fiaskis retrovi la boatiston.

— Verŝajne Laŭtaro jam ne venos. Mi konas lin sufiĉe bone kaj certigas, ke li ne forgesas sian devon.— asertis la gvardiano, kiu ŝajnis esti bonvolema kaj tutklarigema —Sed tamen estas solvo. Ĉirkaŭ la deka alvenos boato de la Nacia Gvardio kun anstataŭantoj de la nokta patrolo. Do, ili povus revenigi vin al via hotelo en la gvardiboato. Ankaŭ du kolegoj kaj mi revenos en la sama boato. Dumtempe vi povas



La insulo de Nemo (VIII) Johano Negrete

promeni, aŭ esti ĉirkaŭ la doko, aŭ dormeti sur sable, ĉar mi mem zorgos serĉi vin kiam la horo alproksimiĝos. Tial ke reguloj ne permesas min proponi vin resti en nia gvatejo, bonvolu ne iri foren.

—Ege bone! Multajn dankojn!— Diris Munja, kiu jam perdis la esperon reveni tiunokte al la gastejo. —Ni atentos— kaj alparolante al Nemo ŝi aldonis susure —La luno belas kaj ni iros vidi kiel ĝi scintilas surakve.

—Do, ni havas plimalpli du horojn por promeni sole, kara. Multajn dankojn, gvardiano. Ni fidas preni vian boaton. Se ne, ĝis morgaŭ!— Diris Nemo kun rezignacio.

—Ne zorgu pri tio. La boato venos kaj havas lokon por vi. Ne maltrankviliĝu, ke vi povas reveni ĉinokte—reasertis afable la gvardiano. —Krome, oni ne permesas resti homojn en la kajeo dumnokte. Kaj pro tio, ni zorgos por ke vi revenu.

—Konsentite. Mi ĝojas. Ni atentos promenante tien kaj reen atentantaj la boaton. — respondis Nemo.

La akvo klariĝis eĉ sub la regado de la plena nokto. La duona luno tremblis surakve, kiel se ĝi volis naĝi per ĝiaj du pintoj, sed ne povis plu avanci. Nur ĝi flotis samloke, pala kaj malliberigita. La silento sin imponis. Nur malforta susuro restis kiel plendo, kiam la akvo retroiris malrapide el la bordo. Oni povus malvere pensi, ke ĉiuj fiŝoj dormadis. Neniu lumo videblas ĉe la lontano. Kelkaj minutoj poste niaj protagonistoj estis denove ĉe la limo de la akvo man-en-mane.

Ĉi-foje Nemo eksentis la muzikon de tiu silento; varmeto ekleviĝis el sia brusto, kaj la koro tiktakis pli forte, antaŭ la figuro de sia tuta Munja kun li dumnokte. Subite la deziro malfermis sian pordon, kaj inundis la scenon. Rigardante la malordan hararon de sia amatino kaj ties vibrantajn okulojn, Nemo estis trafinta de tiu paralizanta magi-sensacio. En harmonio kun la naturo, ŝi estis silenta, sed karespeta. Ambaŭ homoj solas ĉi-momente, antaŭ la nokto, la maro kaj la impona universo-kupolo. Ambaŭ kaptis per la lingvo de okuloj, ke stariĝas oportuno ĝui la plezurajn fantazion de kvietaj maro, la maro kiu ŝajnas dormi, aŭ sereniĝe pretas brakumi la geparon en ĝia sino.

Nemo senvestiĝis la unua kaj nude eniris la akvon senantente pri ŝi. Apenaŭ li naĝis kelkmetrojn, stariĝis kaj turniĝis al la bordo, kaj vidis la korpon de Munja tutnuda piedirante, alproksimiĝanta al li kun brakoj etenditaj flanken por ne fali, kaj mamoj ondulantaj, tuŝitaj de malvarmeto, kaj subventre unu

flava papilio bele krispita, ne kovrita ankoraŭ de la akvo, kies koloro akordiĝis kun sia longa hararo. Kia blanka diino brilanta dumnokte! Tiel ŝi aspektis al li: kiel lampirino!. "Vere belega virino ĉu duonlune ĉu duonlume", li susuris ŝin orele, kiam Munja alvenis lin kaj li brakumis sian diinon vestita per la universa lumo.

Rememorante la poeton:

"Ŝi kroĉis sin al liaj brakoj kiel hedero,
kaj la pasio estiĝis en ŝiakoran akvon,
fajro de l' somero, kie ardis la soifo.
Dolĉa kaj flava rozo klinita al lia koro."

Tial ambaŭ submerĝis ne nur en la akvo sed en la tuta unuiĝo de korpoj, kie la koroj fandiĝis ĝis la pinto de l' stuporo. Ĉar... kiel grandioze estas la seksumado plenigita de amo kaj fandiĝo! Kredeble estas, ke la naturo ĉi tie akiris sian altecon per rondaj vojoj ĝis konvinki al la geamantoj, ke ili nepre devas obei la superan leĝon de allogo kaj fandiĝo kun alia estulo.

Nemo kaj Munja laste vivis tiujn dolĉajn horojn en la soleco de kajeo Pajklana, kaj la nokta maro donacis strangan fenomenon. Dum ili mane removis la akvon malkovris, ke ĝi montris elektrajn rubandojn, tio estas, luman efekton per fasko de lumradioj plenbobelaj, kiuj etendiĝis du-tri metrojn ĝis malrapida estingiĝo. Do ili ludis ripetante multajn fojojn la manmovon sur-kaj-subakve por formi tiujn fosforeskajn rubandojn. Kaj kvankam ili ne komprenis la kaŭzon de la mirinda fizika fenomeno, tamen ambaŭ dankis al la maro tiun strangan donacon, per kiu ili povis spekti la neordinaran belon de iliaj korpoj, lumigitaj per kolorkombino de bluaj kaj arĝentaj briloj en la nokta akvo.

Tiuokaze, antaŭ la reveno al ilia gastejo akompanataj de naciaj gvardianoj, kio estis bonorde plenumita, Nemo kaj Munja ampromesis unu al la alia sub la magia nokto, preskaŭ kiel gejunuloj ĵus enamiĝintaj kaj certe ne tre responsaj fronte al la limoj de ambaŭ, kies situacio ne permesis fari feliĉajn prognozojn.

Li diris al ŝi, ke li adoris ŝin kun amo ne ŝanĝebla kaj obstina, ke lia amo ne estis nur miraĝo brila, sed pura sento feliĉiga. Munja diris al li, ke en lo interno de ŝia koro lia nomo estis skribita kaj ke ŝi elŝirus ĝin propramane se iam estus alio. Kaj aldonis, ke ŝi nenion volis, escepte la amon lian, kaj nenion de li petus krom ĉi tiu infinita amo.

(Daŭrigota)





La 63-a Internacia Fervojista Esperanto-Federacia Kongreso **Raportas: Liba Gabalda**

7a -14a de majo 2011

Ĉeĥaj esperantistoj preparis por fervojistoj eksterordinare bonan IFEF kongreson en la bela nordbohemia urbo Liberec. La aranĝo okazis en la luksa Centro Babylon. Partoprenis ĝin 173 geesperantistoj el 18 landoj. Jam sabate, ĉe la alveno, la loka komitato kunsidis. Vespere okazis interkonatiĝo. Centro Babylon estas komplekso enhavanta hotelon, restoraciojn, konferencejojn, amuzejojn, naĝejon, butikojn kaj aliajn instalaĵojn.

Dimanĉa solena inaŭguro komenciĝis gaje per dancoj kaj kantoj fare de lernejana infangrupo "Jizerka". Infanoj estis bele kostumitaj. Sur podio trafe ornamita per la slogano "La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn" eksidis gravuloj, kiuj salutis kaj bonvenigis la ĉeestantojn. Sekvis salutoj de landaj sekcioj de IFEF kaj oni legis plurajn alvenintajn salutmesaĝojn kaj bondezirojn de eminentuloj. Pro siaj meritplenaj agadoj por IFEF estis honorigitaj s-ino Anna Abelovská, kiu multe zorgis por bona disvolviĝo de la kongreso, la prezidanto de LKK s-ro Ladislav Kovář kaj s-ro Jindřich Tomíšek, kiu konstante kontribuas al diversaj revuoj tradukante novaĵojn el la fervojsfero por la internacia esperantistaro. Post la kantado de Esperanto-himno la prezidantino de IFEF Rodica Todor el Rumanio malfermis la kongreson. Antaŭ la komuna fotado sub la bonveniga banderolo de la hotelo Babylon kelkaj partoprenantoj prezentiĝis en siaj fervojistaj uniformoj.

Vespere por ni koncertis ĥoro Bendl el Česká Třebová, kies du membroj Marie kaj Alois Klumpar ankaŭ kongresis kun ni. El Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, venis kvarpersona delegacio kun la urbestro s-ro Gerhard Walter por prezenti la urbon kaj varbi por la venontjara IFEF-kongreso, kiu okazos tie de la 19a ĝis la 25a de majo. Je la fino de la kongreso estis transdonita la banderolo kun la listo de la okazintaj kongresoj.

Belega kaj bunte ilustrita invitbroŝuro konatigis nin kun vidindaĵoj de Liberec, ĝia ĉirkaŭaĵo kaj prezentis al ni la ekskursan programon. La kongresa libro enhavis ĉiujn aliajn necesajn informojn. En la kongresa teko troviĝis aliaj dokumentoj kaj donacetoj de la fervojo. Efektive ni estis plurfoje pridonacitaj. Krome la urba administracio de Liberec donacis al ĉiuj partoprenantoj senpagan veturadon per publikaj transportiloj dum la kongresa semajno.

Fervojistoj havis okazon en siaj kunsidoj trakti diversajn aktualaĵojn kaj movadajn aferojn. Dum la prelegoj kaj fakaj kunvenoj oni eksciis pri sekurecsistemoj kaj instalaĵoj, pri trajntrafikregado, pri eŭropaj fervojkoridoroj. Oni parolis ankaŭ pri aliaj interesaj temoj. Estis menciita nova moderna kaj multifunkcia trafikterminalo en la urbo Česká Třebová, inaŭgurita pasintjare en septembro. Ĝi ricevas premiojn pro efika investo.

Bone funkciis libroservo, estis eldonitaj E-bildkartoj kaj glumarkoj pri la kongreso. Porokazan stampadon prizorgis oficistinoj de la Ĉeĥa Poŝto. Ĉiutage aperis Kongresa Bulteno, el kiu ni eksciis pri okazintaj eventoj. Ankaŭ la ĉeĥa ĵurnalo "Mladá fronta Dnes" raportis pri la kongreso. Radioamatoroj povis radie kontakti aliajn interesulojn de tiu-ĉi hobia.

Dum la tri duontagaj ekskursoj la partoprenantoj konatiĝis kun kelkaj historiaj vidindaĵoj de Liberec, pri kiuj parolis la loka esperantisto Miroslav Kazdera en siaj prelego kaj promeno tra la urbo de li gvidita. Ni ankaŭ vizitis belan botanikan ĝardenon kaj unikan ZOO-ĝardenon kun blankaj tigroj kaj aliaj ekzotikaj bestoj. Krome allogis ekskurso al la Valo de Kristoforo. Tie oni admiris astronomian horloĝon kaj romantikan trajnponton. Ne pretervidebla estas la monto "Ještěd" kun sia dominantata telekomunika blank-argenta turo kun hotelo. Tuttaga ekskurso gvidis iujn partoprenantojn al Prago, alia celis viziton de du regionaj kasteloj. Ambaŭ ekskursoj kontentigis ĉiujn.

El vesperaj programeroj elstaris la Internacia balo kun tombolo kaj abunda bufedo. Ne mankis la tipa ĉeĥa (saniga) likvoro "Becherovka", kiun ĉiuj povis laŭplaĉe konsumi. Per siaj kantoj ĝojigis nin la famkonata kaj ŝatata JoMo el Tuluzo. Krom li koncertis simfonia orkestro, ĵaza grupo "Big Band" kaj la popola muzikgrupo "Dudáček", kiu uzis, krom aliaj instrumentoj, ankaŭ tipan sakfajfilon. Ĉiuj vesperaj prezentoj plaĉis al la publiko, pri kio atestis longaj kaj entuziasmaj aplaŭdoj.

IFEF okazis en Ĉeĥio la trian fojon. Koran dankon al la organizantoj de la ĉi-jara brila kongreso. La impresoj estas bonegaj!!! Ĉiuj estis ravitaj kaj ege kontentaj hejmenirante kun belaj kaj neforgeseblaj travivaĵoj. Espereble ankaŭ la venontjara IFEF allogos multajn esperantistojn al Herzberg.





La 63-a Internacia Fervoja Esperanto-Federacia Kongreso Raportas: Liba Gabalda

Venezuela Esperanto-Asocio



La reloj ligas la landojn,
Esperanto la popolojn



63-a IFEF KONGRESO



LIBEREC - ĈEĤIO



7 - 14 majo 2011



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda



Beletro sed ne el katedro

Johano Negrete

Necese kaj nepre estas eniri la mondon de la esperanta literaturo por pefektigi la lingvonivelon. Ne mankas tiuj, kiuj ne ŝatas multe la legadon kaj preferas interparoli ĉu rekte aŭ ne kun esperantistoj por progresigi sian vortprovizon aŭ akiri pli bonan regadon de la parola lingvo. Jes sendube, la parolkapablo estas tre grava afero, kiun oni devas praktiki, ĉar ĝi ankaŭ estas simbolo de ke la lingvo vivas kaj renoviĝas. Sed, rilate al la aktiva kapablo akirita per la skriba lingvo, kion oni povus konsili al tiuj studentoj?

Malsame de la scienca aŭ teknika literaturo, kie oni lernas specialan ĵargonon pri branĉoj aŭ disciplinoj de ajna fako, en la literaturo simpla oni troviĝas kun la tutaĵo de la lingvo, kaj malsate bezonas alpropigi ĉiujn eblajn esprimojn de la ĉiutaga komunikado. La literaturo estas ankaŭ la sperto por vivi, por sperti mense kaj kore diversajn situaciojn; por senti fortajn emociojn kaj intimaj sentojn; por vojaĝi tra la tempoj, socioj kaj moroj; por memori kaj lerni pri onia vivo, kaj entute por diri ĉion nur duvorte: por vivadi.

Pro tio kaj aliaĵoj mi rekomendas praktiki la literaturon cele al la esperanta progreso kaj al la plej altaj ŝtupoj de lingvoregado, de ĉiuj studentoj en progresaj kursoj. Eĉ se jam kursoj finiĝis, kaj oni devas progresi tute sole, necesas havi la volon, paciencon kaj konstaton sekvi ekde la unuaj simplaj legaĵoj ĝis literaturaĵoj pli komplikaj. Kaj tio signifas longedaŭra planado. Nur malmultaj esperantistoj havas la konstaton daŭrigi en la longedaŭra ŝtuparo de legado, malkrom se ili jam atingis la punkton, laŭ kiu oni estas vera amatoro kaj derivas plezuron de tiu konstanta renkontiĝo kun libroj.

En bulteno, kiun mi eldonigis kiel redaktoro, kune kun mia edzino kiel grafikistino, titolita Lingvo & Internacia Komunikado (1), mi malfermis kolumnon sub la titolo Beletro, sed ne el Katedro. Vere la titolo estis pruntita de samtiel titolita libro de nia altestiminda aŭtoro Gaston Waringhien (2) Li inventis tiun belan titolon, signalante tiujn, kiuj (kiel mi mem) estas literaturamanto, kvankam ne bone instruita pri analizado el teknika aŭ profesia vidpunkto.

Estas pro tio, ke en tiu ĉi paĝaro de la venezuela Amikaro en la reto, denove mi havas la plezuron malfermi similan kolumnon por komentarii aŭ esprimi impresojn pri legitaj esperantaj libroj aŭ publikaĵoj (ĉu traduko, ĉu originala verko). La kolumn-titolo estos Eo-Libro, kaj pli granda plezuro por mi ankoraŭ estus se la legantaro de tiu ĉi retejo kontribuas ankaŭ per komentarioj en la sama kolumno pri la legitaj libroj. Mi certe kredas, ke vi multe emas legi kaj samtempe deziras sin esprimi viajn spertojn pri tio, kaj en tiu ĉi loko viaj komentarioj estas ĉiam bonvenaj.

Kun koraj salutoj al ĉiuj
Johano Negrete

.....
NOTOJ

(1) Eldonita hispane pri la lingvo Esperanto kaj movado ene de la Instituto Pedagógico de Caracas, 21 numeroj. (1997-2004)

(2) Serio Stafeto N-ro 4, Flandra Esperanto Ligo, 2^a eldono ampleksigita, Antverpeno, 1987.





Kredo, Floroj, Dinamito

De Ernst Olsson

Biografia verketo pri Sankta Birgitta, Karl von Linné kaj Alfred Nobel. (Eldona Esperanto Societo, Malmö (Svedio), 1961).

La verkisto de tiu ĉi libro prilaboris biografian manuskripton esperante pri “Svedaj pioniroj de kulturo, scienco kaj tekniko”. Sed li mortis antaŭ la fino de sia verko. Pro tio inter notoj kaj manuskripto, lasitaj de la aŭtoro, venis Gösta Henriksson alpretigi la tekstojn kaj selekti inter ili tri briografetojn. Eble ili devas esti la plej ellaboritaj aŭ kompletigitaj de Olsson (1904-1948).

Kredo, Floroj, Dinamito, rakontos al vi pri tri famaj svedoj el diversaj medioj kaj epokoj. La unua estas Birgitta, katolika sanktulino en la Nordo (1303-1373), al kiu la papo Bonifacius la IX-a deklaris ŝin sanktulino en 1391. Due pri la botanikisto Linnaeus (1707-17789, la reĝo de la floroj kaj fondinto de la moderna botanika scienco Li estis nobeligita en 1757, kaj de tiam li nomis sin Karl von Linné. Trie la fama Alfred Nobel (elparolata Nobel). Li estis deknaŭa (1833-1896) industriulo kaj inventinto de la dinamito, kaj mecenato, kiu instituciis la konatan Premion kun sia nomo.

Kiel oni konstatas, ili estas tri personecoj de malsimilaj jarcentoj, tri vivoj dediĉitaj al la homa servo, kaj ĉiu en sia karaktero kaj profesio malsimilas, kvankam la tri kunfluas en la historio de Svedio, kaj etendis sian influadon multe pli for de siaj landlimoj. Universalaj svedoj, kiel oni diras, en la religio, scienco kaj teknologio respektive.

Malgraŭ teknikaj nomoj iomete tedaj en la kemia kaj tria parto pri Nobel, ties esperanto estas facila kaj la stilo simpla kaj rekta en ĝia frazkonstruo, de flua legado, tiel kiel taŭgas por biografioj, kiuj intencas esti pli informemaj ol plenaj de literaturaj ornamaĵoj, kio tamen ne kritikindas, se oni povus verki en granda literaturo stilo. Mi kaptis tamen notindan diferencon kvalite inter la tri partoj, kaj konsideras la duan pri la “reĝo de la floroj” (Linnaeus) la plej longa kaj alloga, ĉar en ĝi oni trovas adekvatan kombinon de scienco kun la intima kaj travivaĵa rakonto de la protagonisto. La libro estas vere leginda, kaj mi rekomendas ĝin speciale por junulaj esperantistoj, amantaj de la naturo.

Johano Negrete (7/10/2011)





Internacia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo

Raportas: Liba Gabalda

22a-26a de aprilo 2011

Ĝi okazis ĉe la Mediteranea maro en la urbo Seto (Sète). Ĝi estis bone organizita. La aranĝon partoprenis ĉirkaŭ kvarcent esperantistoj ne nur el Francio, sed ankaŭ el foraj landoj. Venis gastoj el Japanio, Kubo, Nepalo, Rusio kaj el pluraj eŭropaj landoj.

La inaŭguron ĉeestis la urbestro kaj la vicurbestro de la urbo Seto. La urbestro s-ro François Comminhes bonvenigis nin kaj deziris al ĉiuj agrablan restadon. Poste sinsekve salutis la publikon reprezentantoj de diversaj organizaĵoj kaj esperantistoj el ĉeestantaj landoj. Sekvis invito al honorvino. Ĉe la strando ni komune fotiĝis.

La aranĝo okazis ne tro malproksime de la urbocentro en la familia feriejo "Le Lazaret". Tie estis ĉio necesa por akcepti la partoprenantojn. Riĉa taga, vespera kaj ekskursaprogramo kontribuis al bona etoso dum kvin tagoj plenumante dezirojn de ĉiuj ĉeestantoj. La oferto de prelegoj estis abunda. Komprenoble (kiel ofte okazas en ĉiuj E-aranĝoj) ne eblis ĉeesti ĉiujn proponitajn programerojn ĉar pluraj okazis samtempe.

Kunvenis kaj kunsidis Espéranto-France, Sat-Amikaro, Fervojistoj, FET, EDE kaj aliaj. Ĉiuj asocioj kaj laborgrupoj havis eblecon labori kaj diskuti pri siaj agadoj kaj organizaj aferoj. Okazis KER-ekzamenoj. Ni spektis premieron de interesa dokumenta filmo pri Esperanto. Plue ni eksciis kiel Esperanto helpis al migranto el Kongo al Francio por ricevi politikan azilon. Sekvis diskuto pri helpo al rifuĝintoj en tiu-ĉi ne facila situacio. La japanino Sanpei Keiko parolis pri la antaŭ nelonge okazinta tertremo kaj cunamo en Sendai. S-ro Narendra Raj Bhattarai el Nepalo rakontis pri sia lando, respondis al multaj demandoj kaj invitis al la Internaciaj Himalajaj Renkontiĝoj, kiuj okazas ĉiun duan jaron. Pri la E-edukado ĉe Interreto parolis kaj la atelieron pri Vikipedio gvidis Marek Blahuš el Ĉeĥio. Fervojistoj parolis pri vagonara signalado kaj André Mirc prezentis mallongan dokumenton pri la rapideco de trajnoj. La humuron en verkoj de Lorjak kaj Beaucaire prezentis Ĵak le Puil, pri Ker-ekzamenoj informis Katalin Kováts, pri Majaa kulturo kaj kalendaro Philippe Chavignon, pri Kubo Maritza Gutierrez González, pri la lasta verko de Jules Verne Abel Montagut, pri peresperanta solidareco en Bosnio parolis Senad Ĉoliĉ. Pri langvedoka historio informis kaj bildojn prezentis Arno Lagrange. Okazis forumo pri la okcitana lingvo kaj aliaj interesaj programeroj.

Dum la interkona vespero akordionludis Famo. Li ankaŭ akompanis koncerton de Jacques Yvart. En la urba salono "Brassens" la fama kataluna ensemblo Kaj Tiel Plu kaj la frisa ensemblo Kapriol' kantis kaj vigle dancigis la ĉeestantojn. La etoso estiĝis plaĉa kaj gaja.

La lastan adiaŭan vesperon ni spektis tri programerojn: La Teatra Trupo de Tuluzo prezentis "Grandioza Kongreso" verkita de Rikardo Cash. Patric ofertis al ni serion da okcitanaj kantoj. JoMo prezentiĝis unuafoje kun la muzikistoj kaj dancensemblo Solniška. Ĝi estis admirinda kaj neforgesebla slavecstila spektaklo kaj cigana etoso per kiuj finiĝis la lasta vespero.

Okazis pluraj duontagaj ekskursoj. Eblis promeni sur la monteto "Saint-Clair" kaj ĝui belan panoramon de la urbo aŭ ŝippromeni en la haveno de Seto kaj spekti fiŝaŭkcion laŭ nuna moderna elektronika maniero. En Cap d'Agde ni vizitis lokan muzeon pri kolekto de trovitaĵoj en akvo kaj poste la nigran strandon el bazalteroj.

Dum la lunda tuttaga ekskurso ni malkovris la Sudan Kanelon, navigis sur ĝi per ŝipo trapasante plurajn kluzojn kaj admiris ĉirkaŭan pejzaĝon dum bongusta tagmanĝo. Poste ni aŭskultis historion de vinberkultivisto kaj gustumis plurajn speciojn da lokaj vinoj. Ĉe la fino de la ekskurso ni promenis en restaĵoj de opidumo (antikva fortigita loko per remparo kaj fosaĵo) kaj trarigardis muzeon pri arkeologiaĵoj. Alia samtaga ekskurso gvidis la interesulojn al Eta Kamargo.

Dum la marda tuttaga ekskurso ni vojaĝis per vaportrajno tra la pitoreskaj cevenaj montetoj de Anduze ĝis St. Jean-du-Gard. Tie ni tagmanĝis kaŝtanajn specialaĵojn en belstila restoracio. Sekvis vizito al ekzotika bambuejo. Admirindaj estis ne nur bambuaj aleoj kaj arbaro, gigantaj sekvojoj kaj palmoj, sed ankaŭ multaj belaj floroj, kaktaj kaj bonsaĵoj en aparte bela naturo. Laste ni vizitis muzeon pri historiaj kamparanaj tradicioj, pri produktado de silko, bredado de silkraŭpoj kaj krome ni vidis aliajn interesajn aĵojn.

En la ampleksa kaj belaspekta broŝuro ni trovis, krom la programo de la renkontiĝo kaj praktikaj informoj, mapojn pri la urbo kaj loko kie ni estis, historion de la regiono Langvedoko, informojn pri la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kaj raportojn pri aliaj allogaĵoj de la regiono. Estis eldonitaj E-bildkartoj, poŝt-kaj glumarkoj.

Dum la libera tempo eblis rigardi kaj aĉetumi en bone proviziita libroservo. Ĝin prizorgis pluraj asocioj. Oni ekspoziciis multan materialon por vendi: librojn, muzikdiskojn, bildkartojn, glumarkojn insignojn kaj aliajn kutimajn esperantaĵojn. La elekto estis abunda kaj varia.

Bona ideo efektiviĝi komunan renkontiĝon de pluraj Esperanto-asocioj plensukcesis. Ni ĉiuj ĝuis agrablan restadon eĉ se la suno ne ĉiam favoris nin.





Internacia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo

Raportas: Liba Gabalda

Venezuela Esperanto-Asocio



IREM



SETO - FRANCIO



22 - 26 aprilo 2011



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda



La Pupovendejo (La tienda de muñecos)

Tradukis: Ricardo Coutinho

La Pupovendejo
La tienda de muñecos.
Julio Garmendia

Mi ne havas sufiĉan filozofan lertecon por cerbumi pri gravaj pensaj spekulativaĵoj. Tial mia tendenco al malgravaj aferoj, kaj tial mi klopodas pritrakti tiun historion per malmultaj paragrafoj, se oni povus nomi ĝin tiel, de la malnova Pupovendejo de mia avo kiu poste estis de mia baptopatro, kaj poste ĝi estis mia. Tra miaj okuloj tiu vendejo havis la ĉarmon de familiaj rememoraĵoj; kaj kiel aliaj homoj gardas fotojn de siaj prapatroj, tiuj sufiĉas, por remorigis miajn gefamilianojn, mi promenas rigardante ĉe la pupobretaroj, tie estas la maljunaj pupoj, per kiuj mi neniam ludis. Ekde la infanaĝo oni al kutimigis al mi rigardi serioze ilin. Mia avo, kaj poste mia baptopatro, ofte diris, parolante pri tiuj pupoj:

- Ni ŝuldas la vivon al ili!

Ja, mi amis al ili ambaŭ, kaj pro tio ne eblas taksti kiel malgravajn al tiuj, kiuj oni ŝuldas ion tre inda kiel la ekzisto mem.

Post la morto de mia avo, mia baptopatro ankaŭ malpermesis al mi ludi per la pupoj, tiuj restis en la bretaro de la vendejo, ili estis rigore klasifikigitaj laŭ la hierarkio, malpermesante ke neniu intermikso povus okazi; nek la malmultekostaj piedirantaj pupoj havis sufiĉe longan ŝnuron por iri pli ol unu metro kaj duono de distanco sur glata planko, nek la multekostaj kaj aristokrataj pupoj kun tuboĉapelo kaj ĵako, kiuj apenaŭ povis levi elegante la pinton de la piedoj bele enŝuigitaj. Por ambaŭaj specaj pupoj, mia baptopatro neniam elspezis pli da tempo ol la sufiĉa por purigi ilin kaj la bretaron. Estis malpermesate afable rilati kun ili nek ŝerci per ili. Li starigis en la pupovendejo reĝimon kiu falis kiam mi ekproprietigis ĝin, ĉar mia animo ne havis la saman forton por rezisti kontraŭ la ideoj kaj tendencoj liberigaj kiuj nuntempe estas en la etoso de niaj novaj tempoj.

Antaŭ ĉio li trudis al la pupoj la aŭtoritatan rajton kaj respekton antaŭjuĝajn je la ordo kaj je la kutimoj starigitaj ekde la pasinteco en la vendejo. Li trudis ke estas tute konvene timigi kaj rilati rigore al ili kun la

celo kontraŭbatali la konfuzon, la malordon, la anarkion, portantoj ĉiuj la ruinon ĉe la malriĉaj domaĉoj kaj ĉe la grandaj imperioj. Li rigore edukita per eraraj principoj kaj klopodis eduki min tielmaniere; kaj agnoskante ke mi estas la heredonto de la regado en tiu vendejo, li instruis min pri la servera moro de la reganta homo. Parolante pri Heriberto, la junulo kiu ekdelonge servis por la negoco, mia baptopatro traktis kiel la plej aĉa ŝnura pupo kaj traktis lin kiel ligna pupo aŭ pajacoj el segaĵo, tre uzataj tiam. Laŭ sia vidpunkto, Heriberto ne havis pli da cerbokapablon ol la pupoj venditaj, tial li prenis frivolajn kaj virinecajn kutimojn, ĝis nefidi je la pupoj kiuj estis eliritaj je la mano de Heriberto, sen esti venditaj finfine. Tiuj estis apartigitaj el la ceteraj, suspektante ke sendube ili prenis malbonajn kutimojn de Heriberto.

Tiel okazis dum longa tempo, ĝis kiam mi maturiĝis kaj mia baptopatro maljuniĝis ĝis egali al mia avo kiu mi konis dum mia infaneco. Ni ankoraŭ loĝis en la malantaŭa parto de la vendejo, kie apenaŭ ni povis moviĝi inter la pupoj. Tie naskiĝis mi, kvamkam mi estis filo registrita de honestaj gepatroj, mi estis frukto de amoroj en tiu kaŝita loko de la vendejo, kiel kutimas esti la herooj de spritaj rakontoj.

Iufoje mia baptopatro malsaniĝis.

- Mia vido estas malbona –diris al mi- kaj mi ne distingas inter advokatoj kaj kaŭĉukaj pilkoj, kiuj la lastaj estas pli estimataj.

- Miaj kruroj ne havas fortojn –prenis mian manon- kaj mi ne povas piediri senlace dum la mallonga distanco inter vi kaj la fiuloj. Pro tiuj simptomoj mi jam scias ke mi baldaŭ mortos, mi ne fidis je pli da horoj de vivo kaj pro tio vi heredos ekde nun la pupovendejo.

Mia baptopatrino faris longan liston de konsiloj pri la negoco. Poste li faris paŭzon promentante per la okuloj la vendejon kaj la malantaŭan parton. Li rigardis, sen dubo, la pasinteco kaj la nunon, inter la mallongaj muroj tapiŝitaj de simboloj kiuj iliaj kutimaj gestoj. Abrupte li rigardis la soldatojn kiuj staris en la tuta bretaro, li diris:



La Pupovendejo (La tienda de muñecos) Tradukis: Ricardo Coutinho

- Dankon al la militistoj oni ŝultas multajn pacajn horojn. Ili montris al ni bonajn spertojn. Vendi armeoj estas fia negoco.

Mi konsilis al li alvoki kuraciston, sed li nur montris al mi grandan skatolon kiu staris en la angulo.

- Ĝi havas precize saĝulojn, profesoroj, kuracistoj kaj aliaj kleruloj el kartono kaj segaĵoj kiuj restas tie ne ventitaj kaj kaŝas sin en mallumo kiun ili trovas konvena. Ne maltrankviliĝu, do, ekzistas pli da espero en la utilo de tiu varo. Aliflanke, estas tre ŝatataj la porcelanaj pupinoj, per ili oni ricevas pli da profito; ankaŭ pupinoj faritaj el pasto kaj celuloj estas ankaŭ preferataj. Kaj inter la bestoj – ne forgesu-, speciale mi konsilas azenojn kaj ursoj, ĉar ili estis ĉiam subteno de nia hejmo. Post tiuj vortoj mia baptopatro fartis pli malbone kaj petis al mi alporti pastron kaj du religiajn inajn pupojn. Mi sternis mian brakon kaj alportis ilin ĉe la lito.

- Mallonga tempo –li diris, karesante pastran pupon, mi havas ĝin jam delonge, kiu estas malbone vendebla. Vi povas vendi ĝin je dek procento de rabato, tiu egalas la dekontributo por la eklezio. Rilate al religiulinoj zorgu nur unu.

- Heriberto –diris, rigardante al li: mi nur konsilas al vi denove ne sopraniĝu vian voĉon kaj ne tuŝegu la pupojn.

Neniu diris Heriberto, sed siaj plorĝemoj denove estis aŭdataj pli laŭte kaj malharmonie.

Sendube, tiu afero plirapidigis la morton de mi baptopatro, kiu forpasis post kelkaj minutoj je diri tiujn vortojn. Mi fermigis liajn okulojn kaj forviŝis silente mian larman guton. Turmentis min ke Heriberto montris pli doloresprimojn ol mi. Li plorĝermis drone, liaj haroj moviĝis kaj piediris tien kaj reen en la vendejo. Finfine li brakumis al mi:

- Ni estas solaj!

Mi disigis je li senviolente, kaj montrante al li per fingre la pastron, la malbelan kuraciston, la blankajn flegistinojn, pupoj malordigitaj surlite, kaj mi ordonis

al li ordigi la pupojn laŭ sia ĝusta loko...

Julio Garmendia: naskiĝis en la urbo El Tocuyo, ŝtato Lara, je la 9^a de januaro 1989, filo de la doktoro Rafael Garmendia Rodríguez kaj la sinjorino Celsa Murrieta. Pro la malfruta morto de lia patrino, li loĝis ĉe la domo de la avino en la urbo Barkisimeto. Post esti abituriento li alvenis kun sia patro al Karakso je 1915. Kiam li havis 17 jarojn li eklaboris en la ĵurnalo El Universal kaj en aliaj revuoj de tiu epoko, samtempe li partoprenis ĉe intelektaj rondoj de tiu urbo. Li estas unu el la unuaj lernantoj de la Lernejo La Salle. En 1909 publikigas etan eseon en la ĵurnalo El Eco Industrial. En 1914 li kursas ĉe la Instituto de Komerco en Karakaso, kaj post lasas ĝin por preni la redaktadon en la Ĵurnalo El Universal. Li rilatis kun anoj de la Generacio de la jaro 28. Li laboris en la Legicio de Venezuelo en Parizo, poste li estis Generala Konsulo en Ĝenovo, en Kopenhago kaj Novergio ekde 1923 ĝis 1940.

Li inaŭguras la literaturan genron fantastikismo en Venezuelo. En 1927 li publikigis la libro La Tienda de Muñecos (La Pupovendejo), en 1951 aperas La tuna de Oro (La Nopalo el Oro), La hoja que no había caído (La folio kiu ankoraŭ ne falas), El médico de los muertos (La kuracisto de la mortintoj), Difunto yo (Mortinta mi), La Hija de la mafia (La filino de la Mafio), Manzanita (Pometo).

En Karakaso, je la 8^a de julio 1977 mortis tiu fama verkisto.





84-a SAT-Kongreso en Sarajevo

Raportas: Liba Gabalda

30.7. - 6.8.2011

Unuafoje SAT kongresis en Bosnio kaj Hercegovino kaj la kvaran fojon en Balkanio. La kongreso estis bone organizita kun varia programo kaj kelkaj surprizoj. Partoprenis ĝin ĉirkaŭ 70 geesperantistoj el 15 landoj. La plej foraj partoprenantoj venis el Japanio kaj Aŭstralio. La kongreso okazis en bela natura ripozejo. Dum la solena malfermo bonvenigis la ĉeestantojn la prezidanto de la OKK Fetah Zvirac kaj ankaŭ la urbestro de la komunumo Ilidĝa s-ro Senaid Memić. Poste salutis nin Ibrahim Spahić, la prezidanto de la Internacia Pac-centro. La kongreson inaŭguris la prezidanto de la Plenumkomitato de SAT Jakvo Schram. La kongresan temon "Tutmondiĝo kaj nacia fenomeno" pritraktis François Lo Jacomo. Sekvis salutoj de diversaj asocioj kaj poste fotado antaŭ la hotelo "Terme".

Sarajevo estis fondita en la 15-a jarcento. Ĝi riĉas je multaj monumentoj kaj aliaj vizitindaj vidindaĵoj. Promeno en malnova urbo-cento Baŝĉarŝija bone respegulas etnan, religian kaj kulturan mozaikon de bosnia socio. Nuntempe la homoj de pluraj naciecoj vivas en harmonio. En la jaro 1914 pro murdo de la arkiduko Franz Ferdinand, tronheredulo je la Aŭstro-Hungara trono, ekestis la Unua Mondmilito. Alia trista evento, la lasta kruela milito okazis en la jaroj 1992-1995. Pri tiuj okazaĵoj ni estis detale informitaj.

Dum la kongresa semajno oni traktis kutimajn kongresajn temojn, okazis soci-politikaj forumoj, fakaj kaj frakciaj kunvenoj, kunsidis LEA-komitato, komunistoj. Okazis aktiva partoprenado kun viglaj diskutoj. Krom tio ni havis eblecon provi teknikon de kinezoterapio, aŭdi pri la sorto de bulgaraj fervojoj, diskuti pri lingva diverseco kaj utileco de lernado de fremdaj lingvoj, spekti dokumentan filmon pri Esperanto. Solena akcepto de la urbestro okazis en la hotelo mem.

Grandan intereson pri la evento montris amaskomunikiloj en la tuta lando. Aperis pluraj artikoloj en ĵurnaloj, kelkaj intervjuoj estis elsenditaj en radio kaj raportaĵoj pri la kongresaj eventoj aperis en televido. Do, miloj da homoj eksciis pri la kongreso.

Nekutima dum la SAT-kongresoj, sed riĉaj estis turismaj ofertoj plurfoje ligitaj al militaj okazaĵoj. Ni

vizitis militan tunelon elfositan dum la sieĝo de Sarajevo, spektis filmon pri tieaj okazaĵoj kaj rigardis malgrandan ekspozicion. En Srebrenica, dum la tuttaga ekskurso ni vizitis la Memorcentron en Potoĉari, kiu atestis pri kruelaj kaj abomenaj okazaĵoj de la lasta milito. Malgraŭ la renovigo oni rimarkas ĝis nun spurojn: vidiĝas multaj kuglitaj domoj. Ĉe la monumento de militaj pereintoj oni metis florbukedon. En la kulturdomo de Srebrenica okazis packunsido dum kiu oni apelaciis por malpermeso de pafajetaĵoj el bomboj, kontraŭpersonaj minoj kaj por senminigado de Bosnio kaj Hercegovino. En Tuzla ni trarigardis la urbon kaj tagmanĝis en belstila restoracio. Interesa estis ekskurso al bosniaj piramidoj, kie ni promenis tra subteraj vojoj. Dum alia tutaga ekskurso ni vizitis la belan urbon Mostar, mondfama pro sia ponto. En Blagaj Spomenka Stimec prezentis sian verkon, romano "Hodler en Mostar". En la kongresejo estis prezentitaj aliaj du libroj. "Eŭropa Unio - lingvaj kaj kulturaj aspektoj" redaktis kaj prezentis Senad Ĉolić. Nikolao Gudskov el Moskvo prezentis sian libron "Ilustrita enciklopedio de hejmaj mamuloj".

Komence de la kongreso kulminis en Sarajevo festivalo de la kulturo - famaj "Baŝĉarŝiaj noktoj". Ni ĉeestis ĝian ferman festceremonion en la urbo, en kiu prezentiĝis la plej famaj artistoj. La programon partoprenis ankaŭ esperantisto kaj profesia muzikisto el niaj vicoj Lino Markovo el Francio. Li kantis esperantigitan kanzonon "Belaj estas la mostaraj vendejoj".

Vesperaj programeroj estis variaj. Ŝatatajn "Sevdalinkoj" (populara kaj tradicia bosnia muziko) kantis por ni loka solistino de sarajeva opero Lejla Jusić. Aldoniĝis ankaŭ niaj artistoj Lino Markovo kaj Saŝa Filipović kaj loka akordionisto. Ekestis tre plaĉa kaj agrabla etoso, kiu daŭris ĝis post noktomezo. Saŝa Filipović ludis la teatraĵon "Rememoro de unu aktoro". Franjo Leveque el Francio organizis kaj gvidis ĥoron, kiu kantis dum la Internacia vespero. La lasta vendreda vespero estis dediĉita al folkloro spektaklo. Sur la ekstera scenejo prezentiĝis pluraj ensembloj de la kulturarta societo per kantoj kaj dancoj en belaj kostumoj. Tie ankaŭ okazis la solena fermo fare de Jakvo. Venontjare oni kongresos en Ukrainio en Jalto.





84-a SAT-Kongreso en Sarajevo

Raportas: Liba Gabalda

Venezuela Esperanto-Asocio



OSLOBODEN.IE

Uz 84. kongres Svjetskog saveza radnika esperantista

Bosanski pokret za esperanto

Kongres će biti održan u Sarajevu od 30. jula do 6. augusta i okupit će blizu 100 učesnika, predstavnika radničkih esperantistih udruženja iz 20 zemalja svijeta. Ovdje donosimo nastupni tekst predsjednika bh. udruge, uz nužna smjerna.



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda



La dek plej stultaj asertoj de historio (laŭ Sean Covey) Tradukis: Ramo Moraloj-Kastelo

Ĉu vi sekvas blinde la klerulojn, la fakulojn, la specialistojn?
Legu do la jenajn asertojn, kaj vi ĉesos sekvi ŝafe...

La dek plej stultaj asertoj de la tuta historio (Laŭ Sean Covey en sia libro "La 7 kutimoj de la altgrade efektivigaj adoleskantoj")

10-a. Kenneth Olsen, prezidinto kaj fondinto de la firmao *Digital Equipment Corporation*, asertis en 1977 tion: "Estas neniu kialo, pro kiu iu homo ajn havu komputilon hejme."

9-a. Marŝalo Ferdinand Foch, Milita Strategiisto Francuja kaj onta Majoro de la Unua Mondmilito, asertis en 1911 tion: "La aviadiloj estas interesaj ludiloj, sed ili havas neniun pormilitan utilecon."

8-a. Kuracisto Lee de Forest, inventinto de la "aŭdiona" (trioda) tubo kaj iniciatinto de la radio, diris je la 25-a de februaro 1967, ke: "(La homo neniam atingos la lunon), ne gravas kia scienca antaŭeniraĵo ajn aperos estontece."

7-a. Darryl F. Zanuck, direktoro de *20th Century-Fox* asertis en 1946 la jenon: "(Televidilo) ne povos daŭre altiri iun merkaton ajn poste de la unuaj monatoj. La homoj laciĝos pro vidi lignan skatolon ĉiunokte."

6-a. La muzikeldona firmao *DECCA* malakceptis *The Beatles* je 1962 dirante al ili: "Ni ne ŝatas viajn sonojn. La gitarbandoj estas eksmodaj."

5-a. Kuracisto Ian G. MacDonald, ĥirurgiisto de Los-Anĝeleso, estis citita en la revuo *NEWSWEEK* je la 18-a de novembro 1969. La kuracista citaĵo estis: "Por la plimulto de la homoj, la tabakokonsumado produktas bonajn efikojn".

4-a. La telegrafa firmao *Western Union* asertis en 1876 pere de ena komunikaĵo, ke: "Tiu aĵo telefono havas tre multe da difektoj por esti konsiderita kiel serioza komunikada ilo. En si mem, ĝi havas neniun valoron por ni."

3-a. Ptolemeo, fama astronomiisto egipta asertis en la dua jarcento, ke: "La Tero estas la centro de la universo".

2-a. La Reĝo Georgo la Tria de Anglujo asertis skribe je la 4-a de julio 1776 la jenon: "Hodiaŭ neniu grava okazis".

1-a. Charles H. Duell, komisiito pri patentoj de Usono asertis en 1899: "Ĉio, kio povas esti inventita, estis jam inventita".

